# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo septembro 2019**

## NOVAJ KURSOJ EN NOVA AKADEMIA JARO

Finiĝis la ferioj kaj Madrida Esperanto-Liceo rekomencas la aktivadon. Kaj kiel decas laŭ la kalendaro, la unua pretigata agado estas la komenco de nova kurso elementa, kiun gvidos Pedro Hernández la sabatajn matenojn, de 11,00 ĝis 13,00, komencante en oktobro, en la sidejo de la strato Rodríguez San Pedro, 13. Se vi interesiĝas, aŭ konas homojn kiuj deziras lerni, bv kontakti kun Liceo en la adreso madrid@esperanto.es.

Kiel pasintjare, ankaŭ dum la akademia jaro 2019-2020 eblos studi Esperanton en la Centro por Neĉeesta Instruado de Lingvoj (CUID) de la Universitato UNED, oficiale je nivelo A2. La 3an de septembro malfermiĝas la periodo por enskribiĝo, kaj vi povas konsulti la programon kaj ceterajn detalojn en la retejo https://www.cuid.uned.es/.

## RENKONTIĜOJ EN SEPTEMBRO

En tiu ĉi monato ni denove komencas la kutimajn kunvenojn en la sidejo ĉiujn lundajn vesperojn. Ankaŭ komenciĝas la renkontiĝoj de la unuaj sabatoj, kiu ĉimonate okazos denove en Parko de Retiro, la 7an de septembro, je la 6a horo, denove apud la statuo de Ricardo Codorniu, tre proksime al la Vitra Palaco (Palacio de Cristal).

Aliflanke, la 26an de septembro oni festos, kiel tradicie, la Eŭropan Tagon de la Lingvoj, laŭ la iniciato de la Konsilio de Eŭropo. MEL intencas ĝin partopreni, kaj nun studas la eblecojn. Se vi havas ideojn aŭ deziras mem kontribui, bv kontakti kun ni. Ĉiukaze atentu la normalajn forumojn de MEL kaj la Federacio por esti informita pri la evento.

## VIZITIS KAJ VIZITOS NIN

Pluraj ekstermadridaj esperantistoj vizitis nin dum julio kaj aŭgusto, kelkaj el ili survoje al aŭ el la someraj kongresoj.

En oktobro ni atendas la viziton de pluraj esperantistoj el alia landoj. Konkrete anoncis sin Tomaso kaj István el Hungario, kaj eble venos aliaj amikoj. Kelkaj el ili bezonos gastigadon, do ni petas homojn kiuj disponas pri tiuj eblecoj skribu al MEL por organizi tion. Atentu nian venontan numeron kaj la aliajn komunikilojn, en kiuj ni akurate informos pri tiuj planoj.

## KANTABRIO ĈEFROLOS EN VENONTAJ MONATOJ




Dum venontaj monatoj la regiono Kantabrio estos la ĉefrolulo de esperantistaj eventoj en Hispanio. Tie, en la tre bela urbo Comillas, okazos, laŭ decido de Hispana Esperanto-Federacio, la venonta 79a Hispana Kongreso de Esperanto, inter la 30a de aprilo kaj 4a de majo 2020. Vi iom post iom trovos ĉiujn detalojn en la retejo de la kantabra asocio KantEA, en la adreso http://www.esperanto.es/kantea/. Tie vi trovos ankaŭ la aliĝilon, por profiti la plej bonajn kotizojn.

Kiel unua agado rilata al tiu evento, HEF organizis marŝadon laŭ la marborda Jakoba Vojo, por tiu ĉi monato septembro mem. Oni planas marŝadon, kiu ekos el Comillas kaj alvenos al Ĥiĥono (Gijón/Xixón, Asturio). La promenado estos pli-malpli 157 km longa, kiujn oni trairos dum unu semajno, de la dimanĉo 22a de septembro ĝis la sabato 28a de septembro. HEF respondecas pri la organizo kaj la loĝado (en

malmultekostaj hoteloj, en dulitaj aŭ trilitaj ĉambroj), kaj oni ankaŭ dungos malmultekostan entreprenon por transporti la dorsosakojn. La prezo estos ĉirkaŭ 200 eŭroj. Se vi estas interesita aŭ deziras koni pliajn detalojn, sendu senprokraste retmesaĝon al albertogranadosorcero@gmail.com, ĉar ni rezervis spacon por nur 12 parto-prenontoj.




Krome, ankaŭ en Kantabrio okazos en oktobro renkonto de junuloj, la t.n. Benkontiĝo 2019. Ĝi disvolviĝos en Santandero, en la feriponto de oktobro, inter la 10a kaj 13a. Kontaktu kun la junulara asocio HEJS per ĝia retpoŝto hejs@esperanto.es, aŭ per ties sociaj retoj.

## KONGRESOJ EN SOMERO

Somero, kiel kutime, fariĝis la plej trafa sezono por praktiki Esperanton kaj renkontiĝi kun iamaj amikoj kaj fari novajn.

Kelkaj madridanoj ĉeestis la Universalan Kongreson, kiu ĉijare okazis en Lahtio, Finnlando. Dum ĝi oni elektis novan estraron de Universala Esperanto-Asocio, kies nova prezidanto fariĝis la profesoro Duncan Charters, kiun multaj legantoj jam konas, ĉar li aktive parto-prenis la madridan kongreson en 2018. Junuloj ankaŭ partoprenis la Internacian Junularan Kongreson en Liptovský Hrádok (Slovakio)

Sed madridanoj ĉefe profitis la okazigon de la kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda inter la 4a kaj 11a de aŭgusto en Barcelono, kaj en multaj okazoj aktive kontribuis al la programo kaj la tieaj diskutoj. Vi iom post iom povas spekti plurajn videojn de la renkonto en la kanalo de SAT-en-Hispanio, ĉe: https://www.youtube.com/channel/UCygEiTDIwQTlE52xTkfOZ7A.

## APEROJ EN TELEVIDO

Dum tiuj ĉi unuaj tagoj de septembro madrida esperantisto aperas en televido, kelkfoje kun mencioj al Esperanto. Temas nome pri la redaktanto de tiu ĉi bulteno, kaj la okazo estas la konata kvizo “Saber y Ganar”. Spektu ĝin en la televidĉeno La 2 de RTVE, kaj se vi perdis la unuajn programojn, ankaŭ rete en: http://www.rtve.es/alacarta/videos/saber-y-ganar/.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

Kutimaj ĉiusemajnaj kunvenoj de MEL rekomenciĝis jam en septembro, ĉiulunde post la 18,30, kiel tradicie.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo
Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid
Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo
http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es
Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com